# SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc - Roussillon »

72, Avenue Général de Gaulle - 66000 PERPIGNAN ☎ 34.22.18

JARA ABONO : 10 F

C.C.P. 956-28 Montpellier

3-a Kvaronjaro 1980 — N° 76

## 3-a MEDITERANEA SEMAJNO ĈE MARO

Ĝi sukcese okazis de la 21a ĝis la 28a de septembro en SETE, ĉe Lazaret.

34 personoj aliĝis la tutan semajnon, inter ili unu Nederlandanino. La lastan tagon, vizitis nin pliaj esperantistoj : 2 Belgoj, 3 Poloj, 1 Jugoslavo.

Matene, Sinjoroj LENTAIGNE kaj DIEZ gvidis kursojn, kies rezulto estis ekzamenoj : 4 Atestoj pri Lernado, 5 Atestoj pri Praktika Lernado .

Dum la posttagmezoj, la partoprenantoj vizitis Montpellier, les Aresquiers, Ensérune, Pézenas, Marseillan, Agde, boate promenis sur la Laguno de Thau, vizitis ostrobredadojn...Aliaj preferis ripozi kaj sin bani.

Vespere, ni ludis, kantis, admiris filmojn pri Egiptio kaj Islando, diapozitivojn pri la "ŝtonaj kabanoj" (Capitelles), teatraĵojn magiston.

Ĉiuj estas kontentaj?

Venontan jaron, ni rekomencos.

## REGIONA RENKONTIĜO EN CARCASSONNE

Amika renkontiĝo kun la "Tulusanoj" okazis en Carcassonne, Dimanĉon la 26-an de oktobro 1980. Ni rendevuis je la 11-a horo ĉe la ĉefa pordo de la "Cité", t.e. la Porte Narbonnaise. Estis parkejo maldekstre de la pordo.

Ni estis kunportintaj nian tagmanĝon, sed ni manĝis en salono.

*Yvette VIERNE*

---

Estimataj Gesamideanoj ,

La LKK de la Kataluna Kongreso en Vilanova i Geltru (apud Barcelone) petis min festparoladi dum la solena malfermo de la Floraj Ludoj, Dimanĉon 28/09.

Mi akceptis ĉar estas bona okazo propagandi por nia franca kongreso (Pentekosto 1981 en Perpignan).

Mi petis D-inon Vierne anstataŭi min por la aŭtuna kunveno en SETE, tial mi ne havis la plezuron revidi vin. Estas mia nura bedaŭro, ĉar ne estis gravaj problemoj en nia Federacio...

Gravajn laborojn atendas la perpignanaj gesamideanoj por la preparo de la nacia kongreso.

Tutkorajn salutojn ,

René LLECH-WALTER

# omaĝe al : **Robert GENDRE** (1907 - 1980)

La malnovaj membroj de nia federacio certe ekscios kun ĉagreno pri la forpaso de Robert GENDRE ("Bofilo"). Li mortis 73-jara en ~~xxxx~~ Hospitalo de Perpignan la 31-an de julio kaj estis enterigita en Rive~~xxx~~saltes la 1-an de aŭgusto.

En la 1930-jaroj, li aĉetis aron da lernolibroj ĉe brokantisto kaj memellernis esperanton.

Dum trideko da jaroj kun granda sindonemo,kompetenco kaj vera abnegacio, li agadis por esperanto kiel kursgvidanto,vicdelegito de U.E.A. kaj federacia sekretario. En 1958 li redaktoris la nacian organon "Franca Esperantisto".

Poste, pro troa eluzo de siaj propraj fortoj kaj diversflankaj elreviĝoj, li restis flanke de la esperantista aktivado sed, ĝis la lasta momento, fidelis esperanton kaj ties internan ideon.

Dum tiuj lastaj jaroj mi vizitis lin de tempo al tempo en Ille-sur-Têt kaj, je ĉiu vizito mia, li inforpetis pri la evoluo de la movado.

Pro grava kormalsano li estis devigata ĉesi ĉian laboron kaj vivkonsolon li trovis en abunda literatura laboro.

Krom la franca lingvo, bone reganta la katalunan, la hispanan kaj la esperanton, tre kapabla eltordi la latinan kaj la malnovgrekan, li senbride elsuĉis sian tradukkapablon en aŭ el, plej ofte versaj,verkoj kaj adaptoj. En komparaj tradukoj ĉiam estis Esperanto.

En 1973 aperis ĉe "Edicions 62" en Barcelono, la 70-a volumo, 92 paĝa, de la "Antologia Catalana" ("Kataluna Antologio") kies titolo estas "Fabulistes Rossellonesos" ("Rusiljonaj Fablistoj"). Enestas du fabloj de R.G. en la kataluna lingvo : "la azeno kaj la cikadoj" de K. Kalocsay, adaptita el esperanto kaj "la ŝuflikisto kaj la bankisto".

En la prologo de la koncerna volumo la kompilinto, Pere Verdaguer, tre laŭde emfazas la valoron de R.G. (el la kataluna lingvo, pg 14) :...."R.G.,la plej elektita el la tradukintoj-ĉar li sin inspiras tiom de La Fontaine kiom de Kalocsay...."

Komence de 1976 R.G. aperigis "Mes Cahiers du Vallespir" ("Vallespir" estas tute ĉarma parto de Rusiljono) kiu konsistas el kvardek poemoj en la franca lingvo ĉu adaptitaj el la kataluna lingvo, ĉu originale verkitaj de li. En "Midi Libre" (4-a de novembro) la koncerna verko estis tre laŭde recenzata kaj la bone konata modesteco de R.G. substrekita. La recenzisto finis per la jena demando al R.G. : " kial vi ne publikigas kolekton de viaj propraj poemoj en la kataluna lingvo ?".

En aŭ el la kataluna lingvo R.G. verkis aŭ tradukis pli ol 400 poemojn,80 fablojn kaj 1 tragedion (laŭ "fabulistes rossellones" pg 90) kaj li arde esperis povi iam publikigi plian literaturan kontribuon sed manko de monrimedoj kaj ŝanceliĝanta sanstato malhelpis tiun esperon.

Ĉe la tro frue malfermita tombo, kvazaŭ kiel lasta danko al tiu al kiu mi ŝuldas mian esperantistiĝon, revenis en mian memoron la versoj de la svisa espererantisto Karl JOST kiujn R.G. prilaboris f franclingven antaŭ kelkaj monatoj :

<u>La tri tempoj</u>

La tempo estanta
rapide forkuras

La tempo estinta
eterne daŭradas

La tempo estonta
malfrue alvenas.

J. AMOUROUX

# Poezio Floradas en Katalunio.

Dimanĉo 28/9/80 okazis en Vilanova i la Geltrù, urbeto 40 km sude de Barcelono, la Floraj Ludoj, en E-o, por la jaro 1980, organizitaj de la Kataluna Federacio de E-o. La unuaj de tiuj Ludoj okazis en 1909 en Barcelono, sub la prezidanteco de D-ro Zamenhof. Ekde de tiu jaro, la katalunaj asocioj por E-o regule starigas konkurson pri E-aj poeziaj verkoj, el kiuj la plej bonaj estas proklamitaj kaj premiitaj dum la akademia kunsido de la Floraj Ludoj.

Ĉi-jare, la organiza komitato invitis nian samideanon S-ro LLech-Walter, prezidanto de la E-a Federacio "Langvedoko- Rusiljono", k. petis ke li prononcu la festan paroladon, en E-o.

La gastoj, post diservo en E-o, estis afable akceptitaj de la urbestraro, je la 11-a, kaj post honorvino estis inaŭgurita la Straton Zamenhof en la urbo.

Je la 13-a, ĉirkaŭ 200 personoj, E_istoj k. simpatiantoj frate kunvenis en la granda salono de la municipa biblioteko, por ĉeesti la kulturan okazaĵon, sub la prezidanteco de Pastro Manuel CASANOVES, el Barcelono.

Por elekto de la "Regino" kaj legado de la premiitaj verkoj, S-ro LLECH-WALTER kiu mem estas, por la kataluna lingvo, "konservanto de la Floraj Ludoj de la Ora Genisto", el Perpignan, laŭde parolis pri la poezio universala muziko, kaj ekzaltis la fratecajn kaj poeziajn ligojn inter la katalunoj el ambaŭ flankoj de la pireneoj. Longaj kaj vibrantaj aplaŭdoj, precipe flanke de la nombraj gejunuloj, salutis la vortojn de nia oratoro, kaj bone montris al ĉiuj, ke en Katalunio, la intereso pri E-o estas vigla.

La seriozeco de la etoso iĝis iom mildigita, kiam sesopo da ĉarmaj fraŭlinoj ludis mandolinojn kaj gitarojn kaj, je la fino de la akademia kunsido, el ĉiuj gorĝoj elŝprucis unue la Espero, kaj poste la kataluna himno, "Els Segadors" ("La falĉistoj").

Por ni, Perpinianoj, restis tamen plia surprizo survoje al Francio : S-ro Luis HERNANDEZ YZAL invitis nin viziti la E-an Muzeon de SANT PAU d'ORDAL, eta vilaĝo ne malproksime al Barcelono. Tiu vilaĝeto estas vera juvelujo. Kaj kiam S-ro Hernandez malfermas por vi tiun juvelujon, vi ne povas kredi la proprajn okulojn : aperas vastaj salonoj kun belordigitaj bretoj kaj mebloj kaj artaĵoj. Centoj da E-aj verkoj, kelkaj el ili neanstataŭigeblaj trezoroj : manskribaĵoj de D-ro Zamenhof kaj unuaj disciploj, malnovaj, ne plu troveblaj eldonaĵoj ; sume : antaŭ la mirigita gasto troviĝas parto de nia tradicio kaj fundamento. Jes, vera trezoro, monumento pacie kaj pasie starigita, briko post briko, fervora formik-laboro tra la tuta samideana mondo ! Dankon, D-ro Hernandez.

Jen, karaj amikoj, loko nepre vizitenda, eĉ vizitenda, se vi troviĝas en la ĉirkaŭo de Barcelono. Tio pli ol valoras la kromiron.

## N O V A J  K O T I Z O J  de  U . F . E .  por  1 9 8 0

- SIMPATIANTA KOTIZO .......................... 30,00
- MEMBRO ABONANTO .......................... 105,00
- JUNULO 26 JARA ABONANTO .......................... 73,00
- BONFARANTO .......................... 210,00 aŭ 160,00
- LERNEJANOJ ĝis 16 .......................... 6,00

K O M U N I K A Ĵ O !!!!

La kursestroj kiuj atendas de la federacia libro-servo la novan metodon ll estas informataj ke ili ricevos de UFE, fine de oktobro, cirkuleron kun mendilo de la metodo kaj gvidlibro. Samtempe ili ricevos reprodukton de kelkaj paĝoj de la metodo. Do ili memdecidu kaj eventuale mendu al UFE.

Jean HENIN
Route des Clauzes
48 500 LA CANOURGUE

# AL BRAZILIO... KUNE ! !

Ĉar la venonta tutmonda kongreso okazos en BRAZILIA (somero 1981, ni projektas organizi kolektivan vojaĝon arigantan la gesamideanojn de SUDA FRANCIO .

Tio signifas ke ni provos ekflugi el regiona aertereno, kaj ne el malevitebla pariza forejo.

Niaj unuaj informoj eblIgas konsideri la formulon "Charter" laŭ malalta prezo de 2.500 FF (tarifo por 1980, kompreneble), kondiĉe ke almenaŭ 100 vojaĝantoj partoprenos. Pri definitiva kosto, ni interrilatos kun la brazila aerkompanio VARIG...Sed antaŭe, ni devas esti certaj pri tiu necesa nombro. Evidentas ke oni povas kompletigi kun ne-esperantistoj ( jam pluraj favoraj respondoj en Nîmes).

Dum tiuj lastaj jaroj, unu el iniciantoj partoprenis vojaĝojn tra Germanio (Brunsviko,Berlino,Hamburgo...) kun diversaj kunuloj (parantoj de ĝemeliĝita ofico, anoj de la Ruĝa Kruĉo,emerituloj kiujn oni nomas nun "tria-aĝulojn"). Li provis interesigi tiujn novajn konatulojn pri Esperanto (ni renkontis du brunsvikajn samideanojn). Kiel kutime, tiuj maljunuloj kiuj lernas dumvintre anglan aŭ germanan lingvon en sia urbo - Ve! Lamentinda rezultato !- diris ke nia helpa lingvo estus tre utila, sed ke neniu povas studi ĝin kaj paroli kun alilandanoj. Estas strangeta cirklo kiu montras ke nia propagando pli k. pli ne efikas...

Ĉiu el ni estas partopreninta - almenaŭ unufoje- universalan kongreson, sed per siaj propraj rimedoj. Tio estas farebla kiam oni uzas sian veturilon, eĉ sola, kaj eĉ se tio estas troege multkosta.

Demando : Ni, kies celo estas la tutmonda komprenado estus nekapablaj organizi eksteran vojaĝon...Dum ke multaj ne-turistaj asocioj sukcesas ĝin fari...Dum la estanta jaro, la potenca banko "Caisse de Crédit Agricole" sukcesis starigi 7 aŭ 8 vojaĝojn ĝis Bulgario (Aerflugiro el Nîmes-Garons, 8-tagaj-restado en Sofio kaj Varna, prezo : 1.350 F -aprila tarifo)."Midi-Libre" ( 29.10.80 ) ĵus anoncas ke la konata trireaktoro TU 154 uzata de la Kompanioj Aeroflot kaj Balkanair ekflugiĝos el Garons al Plodiv kaj Moskvo kan 144 regionaj vojaĝantoj (5/11). Temas pri du vojaĝoj, kaj eĉ tri kun 430 "charteruzantoj".

Kial, ni ankaŭ, ni ne estas povintaj partopreni la bulgaran plensukcesan mondkongreson en VARMA 1978 ?

Ni ne konas ankoraŭ la kostojn pri restado en Brazilio (8-10 taggoj, kun vizito de Rio de Janeiro). Ni havas tie nian samideanon GRATTAPAGLIA kiun ni akceptis dufoje en NIMES kiam li loĝis en Torino Li povus solvi tiun problemon. Ni konsideras ke la tuta elspezo ĉirkaŭos 5.000 FF, ĉar necesas eviti mallagrablajn surprizojn. Estas evidenta ke estos resendata la tro-donatan monon.

Bonvolu respondi pri tiu propono al Kamarado FRUS kiu starigas la planojn kun Jannez.

Ronéotypé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon

**Directeur de la publication : Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II - Z.U.P. — 30000 NIMES**

Dépot Légal : 3me Trimestre 1980

Imp. Générale, 21, rue de la Madeleine, Nimes